





tejo

tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



La kongres-
organize spertaj
hungaroj tute
sukcesigis la ĉi-
jaran IJK-n!

**Jarraporto
2007-2008
de TEJO**

**Esperantaj
retradioj**

**Parolo de nia
prezidanto pri
70-jara TEJO**



Saluton!

Unue mi bonvenigas la 120 novajn individuajn membrojn de TEJO, kiuj aliĝis dum la ĵus pasinta IJK. Esperable TEJO sukcesos pliriĉigi viajn Esperanto-spertojn, kaj reciproke pluraj el vi helpos pliriĉigi TEJOn.

Bedaŭrinde ĉi tiu numero ne enhavas raporton pri la IJK mem; espereble ĝi aperos en la sekva numero. Tamen, la plejmulto de la enhavo rilatas al aferoj faritaj aŭ deciditaj dum la IJK. Estas raporto pri kunveno de la TEJO-komitato dum la IJK; kaj estas publikigita la festparolo, kiun nia prezidanto Gregor HINKER faris dum la IJK pri la 70-jariĝo de TEJO. Ankaŭ la TEJO-jarraporto kaj la financa jarraporto estis formale akceptitaj dum la IJK-a komitat-kunveno. Do nur la interesa kontribuo al la rubriko Esperanto en Interreto pri Esperantaj retradioj ne rilatas al la IJK.

Mi esperas ke ĉiuj – kaj la novaj kaj la

malnovaj TEJO-membroj – ĝuos la legadon de ĉi tiu numero.

Marcos

Enhavo

TEJO-jarraporto 2007-2008	3-11
Financa jarraporto 2007	12-15
Festparolo de nia prezidanto	16-17
TEJO-komitatkunveno dum la IJK	17
Alvoko kandidatiĝi por IJK 2010	18
Kontakt-informoj	
kaj informoj pri TEJO	19
Rubriko Esperanto en Interreto	20

100.000 artikoloj en la Vikipedio

Je la 15-a de Junio la Esperantlingva Vikipedio atingis sian 100.000-an artikolon. Pli da informoj pri tio troviĝas ĉe [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Gazetara_komuniko_100000)

Gazetara_komuniko_100000

Tamen (simile kiel en multaj alilingvaj versioj de la Vikipedio) preskaŭ duono de la artikoloj estis kreitaj aŭtomate el datumbazoj. Do la artikolkvanto diras nenion pri la enhava kvalito. Sed jam de iom da tempo la Vikipedia komunumo pli kaj pli koncentriĝas je la kvalito de la artikoloj anstataŭ je ilia kvanto, ekzemple per la verkado kaj markado de elstaraj artikoloj.

Ĉiuj estas bonvenaj kontribui per sia scio!

Limdato por 2008:6 – 15-a de novembro 2008!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin.

*Kontribuojn sendu rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Königwinterer Straße 204, 53227 Bonn, Germanujo. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!***

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

*Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: officejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.***

Jara raporto de TEJO-estraro kaj komisiitoj

Antaŭparolo

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario

En la jaro 2007 la nova estraro de TEJO ne estis elektita dum la IJK, ĉar mankis la necesa kvorumo por ke komitata kunsido elektu estraron.

La ofica periodo de la estraro finiĝas kiam nova estraro de TEJO estos elektita. Pro tio, la ofico de estraro prezidata de Thorbjørnsen-Wickstrøm finiĝis nur en decembro, kiam dum la komitata kunsido de TEJO – dum IS en Würzburg (Germanio) – nova estraro de TEJO estis elektita.

Tiu ĉi jarraporto de la TEJO-estraro, pro ne kutima longeco de estrara periodo, rilatas al la agado de januaro 2008 ĝis la fino de majo 2008.

Jen resumo pri la agado de septembro 2007 ĝis decembro 2007:

Komence de aŭgusto 2007 David-Emil WICKSTRÖM demisiis, eliris la TEJO-estraron kaj transdonis la prezidantajn taskojn al Haris SUBAŠIĆ. Post la transdono de la posteno, TEJO restis senkapa ĝis la nova elekto de estraro fine de decembro.

En aŭgusto Haris prezentis na TEJO dum la IJK en Hanojo kaj la estraro elektis na Hungario kiel gastiganta lando por la IJK 2008.

En septembro la estraro elektis na Julia NOE kiel posteulon de Katarzyna MARCINIK kiel volontulo de TEJO en la Centra Oficejo: Koran dankon al Katarzyna pro elstara laboro por TEJO. Haris reprezentis na TEJO en la FOJE-kunveno en Lisabon.

En oktobro Valentina SIDOROVA

demisiis kiel Ĝenerala Sekretario de TEJO kaj eliris la estraron. Anna-Laura H. WICKSTRØM – kiel malmembro de la estraro – transprenis la neprajn taskojn de Ĝenerala Sekretario – ĉefe por ebligi kvoruman komitatan kunsidon dum la IS por elekti novan estraron de TEJO. Katarzyna kaj Julia partoprenis trejntagon pri subvencioj en Bruselo. Estelle LOISEAU kaj Gregor HINKER partoprenis la UNESCO-forumon en Parizo.

En novembro Julia transprenis la oficon de volontulo por TEJO en la Centra Oficejo. Gregor partoprenis la FOJE-forumon en Bruselo. Julia prezentis na TEJO dum la malferma tago en la Centra Oficejo.

En decembro okazis kvoruma komitata kunveno de TEJO dum la IS en Würzburg, kie la nova estraro de TEJO elektiĝis kaj la periodo de la antaŭa estraro ankaŭ oficiale finiĝis.

Enkonduko

raportas Gregor Hinker, prezidanto, estrarano pri KER

Prezentante al vi tiun ĉi jarraporton, ni kiel estraro kaj komisiitoj de TEJO troviĝas en malkutima situacio: laŭ nia percepto, ni nun estas nur je la fino de transira enoficiĝa periodo, kaj jam ni raportu pri pasinta jaro. Tiu truo en la percepto, kiun supozeble kunhavas anoj kaj observantoj de TEJO, rezultas el la kondiĉoj menciitaj en la antaŭparolo.

Administrado

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario

Je malfruo de preskaŭ duona jaro, la

nova estraro de TEJO estis elektita fine de decembro dum la IS en Würzburg, Germanio.

Elektita estis tute nova kvin-kapa estraro, kun jenaj membroj: Gregor HINKER (Prezidanto, KER), Anna-Laura H. WICKSTRØM (Ĝenerala Sekretario), Sergej TYRIN (Kasisto, 2a Vicprezidanto), Rogener PAVINSKI (Landa Agado, 3a Vicprezidanto), Vildana DELALIĆ (IJK, 1a Vicprezidanto).

La nova estraro jam kvarfoje renkontiĝis en Reta Estrara Kunsido (en januaro, marto, aprilo kaj komence de junio) kaj fizike kunvenis por tritaga Estrara Kunsido en la CO la 14-an ĝis la 16-an de marto.

Pri la laboro de la estraro la estraranoj regule raportis al la komitato en la regule aperanta monata retrevuo Komitata Cirkulero.

La aro de komisionoj kreskis per la aldonado de du novaj komisionoj: komisiono pri reta informado (KRETA) kaj komisiono pri amaskomunikilo kaj publikaj rilatoj (KAPRI). Chuck SMITH, antaŭa estrarano pri Informado, iĝis komisiito pri KRETA kaj Felix ZESCH gvidas na KAPRI.

La redaktoroj de KONTAKTO kaj TEJO-Tutmonde daŭrigis sian laboron. Por la reta revuo TEJO-aktuale Julia NOE kaj Gregor HINKER transprenis la redaktadon, por garantii daŭran aperon de la revuo, sed serĉas novan redaktoron.

Ekde novembro 2007 en Centra Oficejo de UEA por TEJO voluntulumas Julia NOE.

Komitato, elektita printempe 2006 kaj kiu oficis ĝis la 31a de majo 2008 havis

du laborsesiojn dum IS en Würzburg. La protokolo troviĝas je http://www.tejo.org/vikio/Komitatkunsido_Dum_IS_2007/2008

Maksimume, ni havis 19 voĉojn kaj partoprenis gastoj sen voĉoj. Komitatanoj elektis novan estraron, decidis pri reta voĉdono en la komitato, diskutis en grupoj informadan strategion, retaj elektelecoj kaj la statuto de JEBUO (Junulara Esperantista Burundia Organizo). La Komitato aprobis Jaran Raporton 2006-2007.

En majo 2008 estis elektitaj tri komitatanoj B por la komitata periodo 2008-2010:

Irmina SZUSTAK, Nicola RUGGIERO kaj Oleksandra KOVYAZINA (ĉar TEJO rajtas al kvar komitatanoj B por la onta periodo, la tri kandidatoj estis aŭtomate akceptitaj).

Por la periodo 2007-2010 TEJO-n en UEA-Komitato reprezentos Peter BALÁŽ kaj Haris SUBAŠIĆ.

Membroj

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario

En la sekvapaĝa tabelo ni vidas ke la kvanto de individuaj membroj de TEJO rapide malkreskis en 2007. La plej grandaj malkreskoj troviĝas ĉe eŭropaj landaj sekcioj (LS-oj); tio ŝajnas rilati al la neeŭropa IJK, kie multaj kutime (re)membriĝas.

Tamen la malkresko ankaŭ estas indiko, ke inter niaj 1959 aligitaj membroj, nur malmultaj scias pri sia tegmenta organizo.

En 2007 la individuaj membroj de TEJO sin indikis kiel loĝantoj de 74 ŝtatoj kaj unu senŝtata (en 2006: 77 ŝtatoj).

Lando	2007	2006	Diferenco
Afganujo	2	1	1
Alĝerio	1	1	0
Andoro	0	1	-1
Argentino	4	3	1
Armenujo	0	1	-1
Aŭstralio	5	1	4
Aŭstrujo	4	6	-2
Belgujo	10	14	-4
Benino	3	1	2
Belorusujo	1	1	0
Bosnujo-Hercegovino	2	7	-5
Brazilo	22	26	-4
Britujo	8	15	-7
Bulgarujo	3	4	-1
Burundio	1	1	0
Ĉado	1	1	0
Ĉeĥujo	4	7	-3
Ĉilio	3	2	1
Ĉinujo	4	3	1
Danujo	6	8	-2
Domingo	1	1	0
Ekvadoro	0	0	0
Estonujo	1	2	-1
Finnujo	7	8	-1
Francujo	27	49	-22
Ganao	0	1	-1
Germanujo	29	40	-11
Hispanujo	4	22	-18
Hungarujo	6	14	-8
Irano	9	8	1
Irlando	1	1	0
Islando	1	1	0
Israelo	10	11	-1
Italujo	10	19	-9
Japanujo	37	12	25
Jordanio	1	1	0
Kanado	3	2	1
Kazaĥujo	4	4	0
Kirgizujo	1	0	1
Kolombio	1	1	0
Kongo, DR	4	0	4
Kostaŝiko	0	2	-2
Kroatujo	3	10	-7
Kubo	3	3	0

Lando	2007	2006	Diferenco
Latvujo	1	1	0
Litovujo	3	5	-2
Madagaskaro	3	7	-4
Malavio	2	5	-3
Meksiko	5	8	-3
Moldavujo	4	3	1
Mongolujo	1	2	-1
Nederlando	9	13	-4
Nepalo	0	2	-2
Niĝerio	1	2	-1
Niĝerlando	1	4	-3
Nikaragvo	0	0	0
Norvegujo	1	3	-2
Nov-Zelando	1	0	1
Pakistano	0	0	0
Panamo	0	1	-1
Peruo	1	1	0
Polujo	5	14	-9
Portugalujo	0	2	-2
Rumanujo	1	1	0
Rusujo	26	38	-12
Salvadoro	1	1	0
Senŝtata	1	0	1
Serbujo	3	5	-2
Slovakujo	7	4	3
Slovenujo	1	3	-2
Srilanko	1	0	1
Sud-Afriko	1	1	0
Sud-Koreujo	0	2	-2
Svedujo	14	11	3
Svisujo	4	6	-2
Taĝikujo	3	3	0
Tajujo	1	0	1
Tajvano	4	7	-3
Tanzanio	1	1	0
Togolando	5	5	0
Tunizio	1	0	1
Ukrainujo	5	6	-1
Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj	0	1	-1
Urugvajo	1	1	0
Usono	13	20	-7
Venezuelo	1	1	0
Vjetnamujo	13	9	4
	393	515	-122

<i>Membro-kategorio</i>	<i>2007</i>	<i>2006</i>	<i>2005</i>	<i>2004</i>	<i>2003</i>	<i>2002</i>	<i>2001</i>	<i>2000</i>	<i>'99</i>	<i>'98</i>	<i>'97</i>	<i>'96</i>
Junaj Membroj kun Jarlibro	229	342	361	267	231	235	337	350	451	451	598	550
Junaj Membroj-Abonantoj (+revuoEo)	128	132	131	137	139	161	201	241	220	260	277	274
Junaj Dumvivaj Membroj	24	25	24	24	23	18	19	19	17	17	17	19
Junaj Dumvivaj Membroj kun jarlibro	13	16	13	15	6	5						
Sumo Individuaj Membroj	394	515	529	443	399	419	557	610	688	728	892	843
Dumvivaj Patronoj	22	21	21	21	18	17	17	17	14	13	12	11
Unujaraj patronoj	60	64	64	76	81	82	90	94	96	100	101	108

Financoj

raportas Sergeo Tyrin, kasisto, kaj Katharina Ignatieva

Vidu la finanĉan raporton en aparta dokumento 'Financa Jarraporto 2007'

Landa Agado

raportas Rogener Pavinski, estrarano pri Landa Agado

Novaj Landaj Sekcioj

Ni kontaktis kelkajn Landajn Sekciojn kaj kelkajn aktivulojn interesatajn revivigi aŭ fondi novan Landan Sekcion de TEJO.

En Meksiko nuntempe aktivas grupo, kiu planas realiĝi kiel Landa Sekcio.

TEJO havis Landan Sekcion en Meksiko ĝis 1981. Nun estas nova ŝanco, ke la Meksika Esperanto Junularo kiu jam aktivas ene de la Meksika Esperanto-Federacio povu fariĝi denove LS de TEJO.

En Peruo antaŭ nelonge aperis raporto pri Esperanto en ĵurnalo kun emfazo pri la junulara agado.

De tiam ni ekis kontakton, por koni kiel statas la agado tie, kaj eble estonte ni povus havi ankaŭ novan Landan Sekcion

en Peruo.

JEBUO (Junulara Esperantista Burundia Organizo) jam en pasinta Komitat-kunveno proponis aliĝon kiel LS de TEJO.

Tiam ĝia statuto ne estis aprobita de la Komitato, kiu proponis ŝanĝojn kaj plibonigojn. Nun, JEBUO refoje proponas sian reformulitan statuton al la Komitato, kiu ĝin analizos dum IJK 2008.

Partoprenu IJK

Ni lanĉis alvokon por konkurso Partoprenu IJK-n ĉi-jare, kiu celas finance subteni la partoprenon de kelkaj niaj membroj en IJK.

Bedaŭrinde la unua alvoko estis iomete malfrue kun ne granda limdato, pro tio ni poste pligrandigis la limdaton. Venis proponoj kaj la estraro faris sian decidon.

Komitatanoj

Finde de majo okazis la nomumo de la Komitatanoj A kaj B de TEJO.

En 2008 estas 27 Komitatanoj A (2 pliaj kompare al 2007) kaj 3 Komitatanoj B (1 plia kompare al 2007).

Komence de la periodo por la nova Komitato, venis pliaj kontribuoj en la

Komitata rondo ol kutime, kio espereble anoncas aktivan Komitaton.

Bedaŭrinde, tamen normala afero estas ke kelkaj gravaj LS-oj nuntempe malaktivis kiel ekzemple REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj USEJ (USona Esperantista Junularo). Pro tio, kaj por pli profunde koni la planojn kaj problemojn de niaj Landaj Sekcioj, kaj por pli bone scii kiel rilatu al ili, ni planas baldaŭ krei ampleksan demandaron al LS kaj Komitatanoj.

Ceteraj

Mi reprezentis TEJO-n en Ĵunarlista Kongreso en Vilnius en majo kaj sendis etan raporton al la komitato.

Eksteraj rilatoj

raportas Gregor Hinker, estrarano pri KER, prezidanto

La laboro de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) fokusiĝis je du kampoj: Je la reprezentado de TEJO en internaciaj forumoj kaj je la klopodo kunlabori kun neesperantistaj junularaj organizoj kadre de projektoj kaj aktivula trejnado.

La reprezentado en internaciaj forumoj baziĝas je kontinueco de la laboro de multaj generacioj de KER-aktivuloj. Ĉefa aktivecero estas la Forumo de la Junularo Eŭropa (FoJE, Youth Forum Jeunesse YFJ). En la FoJE membras pli ol 90 internaciaj neregistaraj junularaj organizoj kaj naciaj junularaj forumoj; ĝi estas pli kaj pli rekonita kiel serioza partnero kaj centro de kompetento je eŭropa nivelo pri junularaj aferoj. Ĝiaj grandaj avantaĝoj estas, ke ĝi permesas al siaj membroj krei retojn inter si, komune opiniumi en eŭropolitikaj aferoj kaj interkonsenti pri komunaj vidpunktoj. Dufoje ĉiujare FoJE invitas al membraj

kunvenoj (COMMEM). En ambaŭ kunvenoj de la raportperiodo (novembro 2007: Bruselo; majo 2008: Barcelono) mi reprezentis TEJO-n.

Pli eksterordinara estis la Junulara Forumo de UNESKO (Unuigint-Naciara Edukada, Scienca kaj Kultura Organizo), kiu okazas kadre de la kunveno de la membraj ŝtatoj de UNESKO. Estelle LOISEAU kaj mi reprezentis TEJO-n dum la kunsidoj kaj disdonis informilojn ĉe propra informbudo.

Cetere, kadre de flegado de la rilatoj kun UEA kaj ILEI, mi partoprenis en kunvenoj de la estraroj en Roterdamo (aprilo 2008) kaj Budapeŝto (marto 2008).

IJK

raportas Vildana Delalić, estrarano pri kongresoj, seminarioj kaj Aktivula Trejnado

Kvankam nia agado kiel estraranoj de TEJO komenciĝis nur antaŭ 5 monatoj, la estraro jam faris multon. Mi okupiĝas pri TEJO-aranĝoj, do Internacia Junulara Kongreso, seminarioj kaj aliaj aranĝoj.

Kiel konate, IJK ĉijare okazas en hungara urbo Szombathely. Ekde komenco de mia posteno kiel TEJO-estrarano mi havas kontakton kun la Loka Kongresa Komitato de IJK. La organizado de IJK iras glate kaj promesas jam tre sukcesan kongreson.

Dum pasintaj monatoj mi havis kontakton kun kandidatoj por IJK 2009 kaj post la ricevo de kandidatiĝoj, longa cerbumado kaj iom da debatoj, la loko de IJK 2009 estis decidita kaj estos la urbo Liberec en Ĉeĥio.

Mi ankaŭ okupiĝas pri aktualigado de broŝuroj, kiuj helpas organizi aranĝojn, kiel ekzemple la broŝuro 'Kiel organizi

IJK'.

Krome, dum pasintaj 5 monatoj kiel TEJO-estrarano, mi partoprenis ĉiujn retajn kunsidojn kaj bedaŭrinde la fizikan kunsidon ne sukcesis partopreni, sekvis mian korespondadon kun organizantoj de IJK, kaj partoprenis semajnajn diskutojn en TEJO-listo kaj aranĝis rabaton por TEJO-membroj dum Ago Semajno (AS).

Centra Oficejo

raportas Julia Noe, TEJO-volontulino

En la jaro 2007 komenciĝis mia volontulado por TEJO en la Centra Oficejo en Roterdamo. Tiel, ekde la 12a de novembro, mi helpas la estraron realigi siajn taskojn. Jen eta superrigardo:

En la oficejo mi ordigis la dosierojn, umis per komputilo, ordigis poŝton, kreis necesajn dosierojn, helpis al Roy McCOY (oficisto de UEA, kiu respond-ecas pri Jarlibro kaj prespretigado) serĉi informojn pri Landaj Sekcioj (kaj aliaj informoj pri TEJO) por TEJO-paĝoj en Jarlibro 2008, dissendis la leterojn al patronoj de TEJO farita de Anna-Laura kaj Gregor, traktas ĉiutagajn retmesaĝojn kaj aliajn poŝtaĵojn de la TEJO-oficejo, voĉlegis el la revuoj Esperanto, Kontakto kaj TEJO-Tutmonde, preparis komitat-kunsidajn dokumentojn laŭ peto de Anna-Laura, preparis estrarkunsidon en Roterdamo kun Anna-Laura, preparis kvizon kaj prelegon por la Malferma Tago kun Gregor, ĝisdatigis retpaĝon kaj vikiojn, aperigis novajn lingvojn en la retpaĝaro, dissendis remembriĝ-alkokon al malnovaj TEJO-membroj, redaktas kaj dissendas TEJO-aktuale.

Mi reprezentis na TEJO dum la Internacia Seminario (IS), kiu okazis en Würzburg en Germanio. Tie mi pretigis

la informbudon de TEJO kaj preparis raporton pri pagoj dum IS.

Informado

KRETO

raportas Chuck Smith, komisiito pri reta informado

TEJO.org nuntempe bezonas tradukantojn al pluraj lingvoj, por ke ni estu vere tutmonda. Mi feliĉas ke ni uzas Drupalon, kiu ankaŭ estas la plej populara Enhav-Mastruma Sistemo (EMS) kaj eblas havi plurlingvan retejon per ĝi, kiel videblas ĉe www.esperanto.info kiu ankaŭ estas farata per Drupal. Nuntempe la retejo estas iom kaosa, sed Joop EGGEN multe laboras por plibonigi ĝin.

En la informada fako, mi vere sentas la bezonon por pli multe da paperaj materialoj, por ke ni povu pli bone reprezenti nin ĉe konferencoj kaj foiroj. Cetere, mi longe diskutis kun Derk EDERVEEN pri la ideo havi retan administran sistemon por Pasporta Servo por ke ni povu multe plifaciligi ŝanĝadon de datumoj por gastigantoj kaj samtempe malpliigi la laboron de Derk. Se vi interesiĝas pri tiu tasko, vi povas rekte kontakti Joop aŭ la estraron pri tio. Resume, nenio revolucia okazis dum la lasta periodo de la TEJO-estraro, sed simple pli evoluiga.

KAPRI

raportas Felix Zesch, komisiito pri amaskomunikiloj kaj publikaj rilatoj

Kreado de la komisiono kaj ties taskoj

Ekde la komenco de la jaro 2008 ekzistas en TEJO nova komisiono kun la

nomo 'Komisiono pri Amaskomunikiloj kaj Publikaj Rilatoj', mallongigo KAPRI. La supera celo de la komisiono estas kreado de korporacia identeco de TEJO. Tiu respuguliĝu en konkretaj tuŝeblaĵoj. La ĉefaj taskoj dum la oficperiodo estos:

- la prilaborado de la interreta paĝaro, interalie ties multlingvigo, kunlabore kun la komisiono pri reta agado (KRETO) gvidata de Chuck SMITH

- la kreado de broŝuro disdonebla al aliaj organizaĵoj, ĉefe en la kadro de la Eŭropa Junulara Forumo (EYF - European Youth Forum)

- la kreado de adreskartetoj utiligotaj en kontaktoj kun la reprezentantoj de aliaj junularaj organizaĵoj

- opcia tasko: Verkado de TEJO-kateĥismo kun oficialaj respondoj al demandoj pri TEJO, donindaj dum intervjuoj aŭ interparoloj kun aliaj organizaĵoj

Anoj de la komisiono

Komisiita de la estraro por la gvidado de la komisiono estis Felix ZESCH, Germanio. En la komisiono krome anas Julia LITVINOVA (Rusio/Belgio) kaj Nastja KOĴEVNIKOVA (Rusio/Danio).

Rezultoj

La laboro ĝis la redakto de tiu ĉi raporto ankoraŭ ne kreis rezultojn. Ĉefe pro neatendite multa profesia laboro por la komisionestro. Ankaŭ lia engaĝiĝo en la landa sekcio prenis multe da Esperanto-dediĉita tempo de la komisionestro. Aliaj faktoroj por ĝisnuna nesukceso estis:

- miskomprenoj pri la celo de la broŝuro, la ambicia plano por la kreado kreita komence de la oficperiodo, ne povis esti tenata.

- Manko de komunikado de adresdatumoj fare de la estraranoj por la adreskartoj

- Partopreno en laborkunsido pri Aktuale.info

La komisionestro partoprenis kunsidon pri la projekto 'Aktuale.info', kiu celas krei multlingvan informretejon pri Esperanto-rilataj novaĵoj por la ekstera mondo. Pri tiu ĉi kunsido en Poznano, Pollando, la komisionestro raportis skribe al la estraro.

Raportero:

"Aktuale.info celas esti la plej abunda kaj plej informriĉa interreta informejo pri Esperanto-rilataj aferoj. Ĝi disponigu siajn informojn en multaj lingvoj, tradukojn prizorgu volontuloj. En Aktuale.info estos tradukataj novaĵoj kaj artikoloj el kaj al diversaj lingvoj. La bazo estas aŭ nacilingva propono aŭ Esperantlingva propono. Krome troviĝos en la paĝaro kolekto de utilaj informoj por interesatoj kaj ĵurnalistoj. Tiuj informoj ne nepre devas esti integra ero de aktuale.info, sed ankaŭ povas esti uzataj per ligilo.

La origina ideo ekestis, kiam evidentiĝis granda bezono de lernu!-uzantoj informi pri novaĵoj. Kvankam la lernu!-paĝaro estas teknike tre progresinta, ĝi ne povas ankoraŭ transpreni tiun ĉi funkcion. Aktuale.info plenu ĝin do. Eblos alŝuti nacilingvajn (kun Esperantlingva resumo) kaj Esperantlingvajn artikolojn, kiuj poste povus esti tradukotaj al aliaj lingvoj. Krome eblos preni materialon de aktuale.info al naciaj gazetoj, kaze ke mankas artikoloj."

La celo de la kunsido estis planado de la plua projekto kaj pretigo de projekt-

plano, kiu servu kiel dokumento por la monpetado por la realigfazo de la projekto, kiu (estis akceptita kaj) estos financata de Esperantic Studies Foundation. Pluaj progresoj en tiu ĉi grava projekto estas ĝisdate ne raportindaj. Naciaj aktivuloj por la projektoj, kiuj okaze ankaŭ povas esti pagataj, estas serĉataj.

Pasporta Servo

raportas Julia Noe, TEJO-volontulino

Pasporta Servo fidele aperadas. Eldono 2008 aperis kun malfruiĝo en aprilo, presita de eldonejo NEPO (Maciej Wnuk) el Pollando. En ĝi vi trovos 1225 gastigantojn el 90 landoj kaj 24 mapojn.

Ni daŭre uzas la administran sistemon reprogramitan en *Microsoft Word*, por faciligi kaj plifleksebligi la administradon. Jam pasintjare iom ŝanĝiĝis la aspekto kaj la simboloj, kio ŝparis pli ol 10% de la paĝoj.

La nombro da gastigantoj kaj la nombro da landoj iomete malkreskis. Pasporta Servo daŭre spertas malfacilaĵojn kaj problemojn:

- duono de la landoj havas nur unu ĝis tri gastigantojn, kaj duono de la gastigantoj loĝas en nur dek landoj

- multaj gastigantoj ankaŭ ĉi-jare rezignis pri sia 'senpaga' ekzemplero kaj libervole donacis monon, tamen daŭre necesas tia engaĝiĝo por teni Pasportan Servon nedeficita

- urĝe mankas persono kiu povus dediĉi iom da tempo al la 'eksteraj rilatoj' de Pasporta Servo, al pli aktiva vendado de la libro, kaj al enspezoj per donacoj, anoncoj ktp.

Ekde 2007 ekis la ebleco de elektronika adreslibro por gastigantoj, kiuj deziras

tion, por tiumaniere ŝpari preskostojn kaj afrankojn. Pli da informoj vi trovos en la retejo de la Pasporta Servo (www.tejo.org/ps).

Komisiito de Pasporta Servo estas Derk EDERVEEN.

TEJO Tutmonde

raportas Marcos Cramer, komisiito, redaktisto de TEJO Tutmonde

TEJO Tutmonde (TT) daŭre aperis laŭ ĝia regula aperritmo ĉiun duan monaton. Fine de 2007 okazis iomaj malfruiĝoj en la dissendado de TT pro tio ke TT estas ĉiam sendata kune kun Kontakto, kiu estis pretigita kun malfruiĝo. La numero 2008-1 de TT estis dissendita sen Kontakto, kaj nun la TT ĉiam estas dissendata kune kun la antaŭa numero de Kontakto (do numero 2008-2 de TT estis dissendita kune kun numero 2008-1 de Kontakto).

Ekde numero 2008-2 ekzistas nova rubriko 'Esperanto en Interreto', al kiu ĉiu povas kontribui, prezentante interesan Esperantan retpaĝaron. Ankaŭ daŭre ekzistas la rubriko, en kiu TEJO-membroj povas prezenti sin mem.

Ofte venis nesufiĉe da kontribuoj. Mial deĉis plurfoje mem verki kontribuojn, aŭ reuzi materialon jam publikigitan aliloke. Estus bone, se la membroj de TEJO kontribuas pli multe al sia gazeto, por ke ĝi daŭre restu kiel eble plej interesa.

Kontakto

raportas Paŭlo Moĵajev, komisiito redaktanto de Kontakto

Mi transprenis la redaktadon de 'Kontakto' aŭtune 2007. De tiu tempo sub mia gvido aperis la jenaj numeroj de la

revuo:

- 220 (2007:4) kun la ĉeftemo 'Kune - por pli bona mondo'
- 221 (2007:5) kun la ĉeftemo 'Ekologio'
- 222 (2007:6) kun la ĉeftemo 'Literaturo'
- 223 (2008:1) kun la ĉeftemo 'Neordinaraj hobiaj'

Krom mi mem al la preparado de la revuo kontribuas ankaŭ Ĵenja ZVEREVA-AMIS (antaŭa redaktanto de la revuo, kiu nun faras la grafikistan laboron) kaj Aleksandro GALKIN (kiel provleganto).

Bedaŭrinde la revuo daŭre aperas kun ĉ. 2-monata malfruiĝo (kiu malrapide kresketis jam pasintjare), kiun mi dume ne sukcesas forigi (tamen, mi ja penas fari tion kaj mi nepre faros). La ĉefa problemoj daŭre estas manko de kontribuoj, tial mi alvokas ĉiujn interesitojn, ĉiujn ordinarnajn TEJO-anojn: verku mem por la revuo pri la temoj, kiuj vin interesas kaj verkigu viajn amikojn kaj/aŭ lernantojn! La planitaj temoj estas:

- 224 (2008:2) – 'Teknologioj kaj scienco'
- 225 (2008:3) – 'Edukado tra la mondo'
- 226 (2008:4) – 'Politikaj unioj -- ĉu vere unuecaj?'

Krome, okaze de la ĉi-jara jubileo de TEJO estas planata aperi specialan teman numeron pri la historio de TEJO, pri ĝia nuntempo kaj estonteco, pri ĝiaj problemoj kaj perspektivoj: do – pri TEJO ĝenerale. Tamen bonvenaj estas ankaŭ alitemaj kontribuoj!

Mi estas malferma al ĉiaspeca kunlaboro kaj ĝoje akceptos ajnan helpon!

Listo de mallongigoj

AS	Ago Semajno
CO	Centra Oficejo
FOJE	Forumo de la Junularo Eŭropa
IJK	Internacia Junulara Kongreso
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
IS	Internacia Seminario
JEBUO	Junularo Esperantisto de Burundio
KAPRi	Komisiono pri Amaskomunikilo kaj Publikaj Rilatoj
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KRetO	Komisiono pri Reta agado
LKK	Loka Kongresa Komitato
LS	Landa Sekcio
PS	Pasporta Servo
REJM	Rusia Esperantista Junulara Movado
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT	TEJO Tutmonde
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso
UNESKO	Unuiĝint-Naciara Edukada, Scienca kaj Kultura Organizo
USEJ	Usona Esperantista Junularo

Financa jarraporto de TEJO

Kalendara jaro 2007

Raportas Sergej TYRIN, kasisto

La jaron 2007 TEJO konkludis kun negativa rezulto de -4.100 EUR; tamen ĝi momente daŭre posedas iom pli ol 90.000 EUR, kio garantias financon stabilecon eĉ kaze de minusa finkalkulo kiel ĉi-jare. Bedaŭrinde, pro malstabileco en la estraro dum la jaro, signife malpliigis la kutime akirataj enspezoj kiel ekzemple donacoj al TEJO (komparu 1.580 EUR en 2006 kun nuraj 80 EUR en 2007). Same notindas ke ne estis faritaj EJK- kaj YOUTH- subvencipetoj kiuj kutime kovras la elspezojn por produktado de la revuo Kontakto kaj por organizado de seminarioj (kiuj ne okazis en 2007, pro kio la jara rezulto ne estas tiom signife negativa).

Estas laŭdinda la pozitiva agado de Pasporta Servo jam por dua sinsekva jaro, kiu strebante esti finance sendependa de TEJO, tre sukcese varbis por donacoj, kio rezultigis – same kiel en 2006 – pozitivan finkalkulon. Ankaŭ la nivelo de vendoj estas kontentiga kaj kontribuis al la ĝojiga bonfarto de la eldonaĵo – kio montras la gravecon de daŭra reklamado de Pasporta Servo, kiu estas unu el plej notebaj TEJO-agadaroj.

La administraj kostoj, kiel tenado de la oficejo kaj de la volontulo, estis pli-malpli samaj kiel dum la pasintaj jaroj, kaj la nura senŝanĝa enspezfonto por TEJO restas la membro-kotizoj, kiuj enspezigis ĉirkaŭ 4.500 EUR en 2007. Evidentas ke TEJO restas tre dependa de ekstera subvencio – ĉu per donacoj, ĉu per eŭropaj fondusoj, kaj necesas

konstante varti tiujn ĉi monfontojn, per aktiva prezento de la organizo.

Jarkalkulo 2007 – Katharina IGNATIEVA, antaŭa kasisto

Titolo	Debeto	Kredito	Totale
	EUR	EUR	EUR
Volontulo			
poŝmono			
volontulo	5300.00	0.00	-5300.00 ^{*1}
vojaĝoj volontulo	224.00	0.00	-224.00
sanasekuro			
volontulo	355.40	0.00	-355.40
alia			0.00
			-5879.40
Oficejaj kostoj			
luado de oficejo	828.00	0.00	-828.00
kopiado	188.85	0.00	-188.85
retkostoj/ komunikado/ telefonado	116.41	0.00	-116.41
poŝtokostoj	272.90	0.00	-272.90
aĉeto de oficejaj materialoj	316.66	0.00	-316.66
alia			0.00
Totale Kostoj			
Oficejo			-1722.82

Tabelo de TEJO-spezoj 2007

Subvencio Administraj Kosto			
EJF C subvencio (Konsilio de Eŭropo)			
*50% bilanco por EJF C 2006	0.00	4218.00	4218.00
YOUTH (4.1) Administra (Eŭropa Komisiono)			
*bilanco YOUTH 4.1. 2006	0.00	1800.00	1800.00
Totale Sub- vencioj Admi- nistraj Kosto			6018.00
Laŭstatutaj spezoj			
TEJO-parto de MJT, MAT, JAM, PT kotizoj 2007	0.00	2165.89	2165.89
TEJO-parto de PT kotizoj 2007	455.25	2755.33	2300.08
Komitata Kun- sido dum IJK	0.00	0.00	0.00
Laborkostoj Estraro	0.00	0.00	0.00
Registriĝo ĉe Ĉambro de Komer- co en Nederlando	278.10	0.00	-278.10
Estraraj Kun- sidoj (vojaĝoj, loĝado, manĝoj)	3008.61	0.00	-3008.61
Totale Laŭ- statutaj spezoj			1179.26
Aktivaĵoj			
Trejnseminarioj dum TEJO-aranĝoj	0.00	0.00	0.00
EJF A	0.00	0.00	0.00
YOUTH Action 5 trejnseminarioj	0.00	0.00	0.00

EJF B (Revuo Kontakto)			
*Kontakto 2006, bilanco peto EJF de 2006	0.00	0.00	0.00
*Kontakto 2007, antaŭpago	0.00	0.00	0.00
Revuo TEJO-Tutmonde			
*redaktado	0.00	0.00	0.00
*grafikumado	0.00	0.00	0.00
*presado +sendado	2659.64	0.00	-2659.64
*abonoj	0.00	0.00	0.00
Retrevuo TEJO-Aktuale	0.00	0.00	0.00
Pasporta Servo			
*redaktado			
*presado+sendado	4300.00	0.00	-4300.00
*komisiaj vendoj 2006	0.00	2384.00	2384.00
*vendoj de TEJO	0.00	0.00	0.00
*donacoj alia	0.00	2450.20	2450.20
Totale Aktivaĵoj			534.20
KER			
kotizo Eŭropa Junulara Forumo (FoJE)	1376.00	0.00	-1376.00
United for Inter- cultural Action	55.00	0.00	-55.00
Laborkostoj Aktivuloj	0.00	0.00	0.00

Vojaĝkostoj			
Aktivuloj	630.15	892.45	262.30
Kotizoj			
Lingvokursoj	200.00	120.50	-79.50
Totale KER			-1248.20
Informado			
varbado (patronoj, membroj)			
informiloj	400.00	0.00	-400.00
pago de ret-servilo tejo.org	42.55	0.00	-42.55
presado de TEJO-kalendaroj	240.00	0.00	-240.00
Kotizoj TT	0.00	163.67	163.67
Totale Informado			-518.88
IJK			
Preparkunsido IJK	1021.78	1004.96	-16.82
Estraro IJK	925.00	0.00	-925.00
Licencpago IJK	813.50	813.50	0.00
Profito/Deficito IJK	307.00	307.00	0.00
Subvenciado partoprenantoj IJK		0.00	0.00
Alia (aĉeto filmilo)	196.64	233.57	36.93
Totale IJK			-904.89
Totale UK	0.00	0.00	0.00

TEJO-spezoj 2007 (daŭrigo)

Landa Agado			
Laborkostoj			
Aktivuloj/ estrarano LA	0.00	0.00	0.00
Vojaĝkostoj			
Aktivuloj	0.00	0.00	0.00
Afrika Junulara Fondaĵo	120.00	0.00	-120.00
Membrigoj en TEJO	35.00	0.00	-35.00
Totale Landa Agado			-155.00
Financa Administrado			
bankokostoj	96.29	0.00	-96.29
rentumo	0.00	1218.31	1218.31
Totale Financa Administrado			1122.02
Aliaj spezoj			
Donacoj	0.00	80.00	80.00
Alia	0.00	0.00	0.00
Totale Aliaj Spezoj			80.00
Totale			
Elspezoj	€ 24,762.73		
Totale Enspezoj		€ 20,607.38	
Rezulto Jaro 2007			€ -4,155.35

Fondusoj	31.12.06	31.12.07
Junulara Fondaĵo (tejtej)	€ 95,472.30	€ 91,316.95
Ŝparkonto de TEJO (tejo%)	€ 17,385.64	€ 18,199.72
Fonduso Dumvivaj Patronoj	€ 18,408.39	€ 20,133.39
Fondaĵo Rezervo IJK	€ 6,544.31	€ 6,851.31
Fondaĵo Partopreno IJK	€ 2,174.83	€ 1,174.83

*11

Komentoj

* 1	100 EUR/semajne
* 2	TEJO ricevas 10% de MAT, 25% de MJT, 50% de JAM, 75% de PT kotizoj.
* 3	en 2007 TEJO ne faris subvencipeton EJF A (vidu ĉi-supre), nek EJF B. Sekve TEJO ne rajtis peti EJF C (administran)
* 4	en 2007 TEJO ne faris subvencipeton YOUTH 5 (vidu ĉi-supre)
* 5	vendoj de PS pere de Libroservo de UEA
* 6	en 2007 TEJO-aktivuloj partoprenis FOJE-kunsidojn, FOJE- trejnadojn, UNESCO-forumon. kredito montras repagon de FOJE de vojaĝkostoj de TEJO-aktivuloj
* 7	vojaĝkostoj de D.E. Wickström al LKK-kunsido en Hanojo, plejparte subvenciitaj de "The Vietnam Union of Friends"
* 8	IJK 2006
* 9	IJK 2006
* 10	en kredita parto estas registritaj privataj donacoj por aĉeto de la filmilo
* 11	en 2007 la fondaĵo subvenciis partoprenon en IJK en Hanojo de A. Lutz kaj A.Joshi

Listo de mallongigoj

EJF A	Eŭropa Junulara Fondaĵo A, subvencio de Konsilio de Eŭropo por organizado de internaciaj junularaj renkontiĝoj (TEJO kelkfoje ricevis ĝin por organizado de diversaj aranĝoj, ekz por organizado de interkultura festivalo dum IJK en Pollando)
EJF B	Konsilio de Eŭropo por internaciaj junularaj aktivajoj aliaj ol renkontiĝoj (TEJO kelkfoje ricevis tiun ĉi subvencion por la revuo Kontakto)
EJF C	Eŭropa Junulara Fondaĵo C, administra subvencio de Konsilio de Eŭropo
YOUTH 4.1	Subvencio de Eŭropa Komisiono (por administraj kostoj de junularaj organizoj)
MJT	membro de TEJO kun Jarlibro kaj abono al Kontakto/TEJO-Tutmonde
MAT	membro-abonanto, t.e. membro de TEJO kun Jarlibro kaj abono al revuo Esperanto, Kontakto kaj TEJO-Tutmonde
JAM	Juna Aligita Membro, t.e. membro de Landa Sekcio por kiu estis pagita aparta kotizo al TEJO. Ne estas individua membreco
PT	Patrono de TEJO
FOJE	Eŭropa Junulara Forumo
KER	Komisiono de Eksteraj Rilatoj
TEJK	Tut-Eŭropa Junulara Konferenco

Festparolo de nia prezidanto dum la IJK en Szombathely

Estimataj gesinjoroj,
karaj Esperantistinoj, Esperantistoj,
Esperantistoj,
gesamideanoj kaj gemalsamideanoj,

Okazis en la jaro 1938, ke en la lastaj radioj de la antaŭmilita vespera suno du junaj nederlandanoj naskis bebon de espero – nian karan jubileanton. Ŝliaj gepatroj – s-ino Van Veenendaal-Bouwes kaj s-o Van Veenendaal – estis instruista paro, kiu ne povis multon al sia ido oferti kaj tamen, nutrante ĝin per iliaj kredo en l' homar' kaj idealismo esperanta, ofertis al ĝi la plej valoran donacon.

Ĉu en tiuj fruaj tagoj la gepatroj povus antaŭvidi ke jam je la aĝo de 14 jaroj ilia ido petos nomŝanĝon al la registriĝ-oficejo, kaj ke kelkaj jaroj poste ĝi elektus novan adopt-patrinon (cetere ne sen financaj intereso, kiel poste evidentiĝis)? Komune, ili travivis la katastrofon de la mondmilito, kaj komune ekvivis en novnaskiĝanta Eŭropo.

Enirante sian junularan aĝon, nia jubileanto komencis rebelumi – trajto en



ŝlia personeco, kiun observi eblas en ĝia tuta plua vivsinsekvo de temp' al temp' – kaj al si mem donis novan nomon. La ligo kun ŝlia adoptpatrino elektita en 1956 (je l'aĝo de 18) radikas jam el ŝliaj plej fruaj infanctagoj, nutrita per okulfrappe similaj intereso. Tamen daŭris

1938	dum la 1a „Internacia Junulara Kunveno“ en Groet (Nederlando) estas fondita la „Tutmonda Junulara Organizo“
1952	8a IJK en Ry (Danio): „Tutmonda Esperantista Junulara Organizo“ (TEJO)
1956	TEJO fariĝas Junulara Sekcio de UEA
1963	<i>Kontakto</i> estas naskita
1983	<i>TEJO</i> Tutmonde aperas unuafoje
1981	<i>BEMI</i> fariĝas faka sekcio
1991	<i>EUROKKA</i> fariĝas faka sekcio
2003	<i>E@I</i> fariĝas faka sekcio
2008	La <i>Junulara Esperantista Burundia Organizo</i> estas bonvenita kiel 44a landa sekcio de TEJO

ĝis 1971 ke la nova patrino akceptis loĝigi la elektitan idon en sia domo kaj pagi al ŝli poŝmonon (kaj fojfoje ŝliajn ŝuldojn).

Intertempe, nia jubileanto aktivis en diversaj metioj, sen iam ajn akcepti redukti sin mem je la tiumomenta rolo: ŝli estis instruisto, foje diplomato, dancisto, scienca esploristo de alkoholaĵoj, foje projektmastrumisto, foje informadikisto. Foje ankaŭ pigrulo. Plej ofte ĉiuj samtempe.

Ĝisdate tri idojn naskis nia jubileanto: ĝia unua estas malprofesia, sed despli entuziasma biciklisto kiu jam plurfoje rondiris la mondon. La dua estas ekde frua aĝo aktiva talenta rokmuzikisto – kiun la festito tamen nur 3 jarojn post ĝia naskiĝo kiel ido oficialigis. La tria ido ene de mallonga tempo karieris je monda

nivelo, almenaŭ en ciferecujo. Apenaŭ iu ne uzas kaj aprezas ĝiajn produktaĵojn.

Ofte oni demandas pri la loĝloko de nia jubileanto, kaj la respondo malfacilas: surprize ke malgraŭ siaj modestaj financoj nia jubileanto ŝajnas havi loĝejojn en pluraj dudekoj da landoj, kaj ŝlia amikaro simile vastas. Des pli ĝojige ke malgraŭ tiu evidente streĉa vivo nia jubileanto apenaŭ maljuniĝas, ofte eĉ male plijuniĝas!

Mi ĝojas ke ŝli estas hodiaŭ inter ni kaj invitas vin ĉiujn: brakumu la festiton, ĝoju kun ŝli!

Gratulon al ĉiuj kiuj iam anis al kaj estis la hodiaŭa jubileanto,

Gratulon al ni ĉiuj kiuj hodiaŭ ĝian nomon plenigas per vivo kaj spirito,

Gratulon pro ĝia 70a naskiĝdatreveno al la T. E. J. O.

TEJO-komitato kunvenis dum la IJK

Multnombre kaj laboreme...

Dum la 64a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Szombathely (Hungarujo) la komitato de TEJO kunvenis al sia jarĉefkunveno. Dum la kvar sesioj 26 anoj de la komitato kaj pluraj ĉeestantaj vizitantoj vigle diskutis la raportojn de la estraro kaj aprobis ĝian laboron.

Nova landa sekcio, nova homforto

Jam komence de la kunveno la komitato ĝoje bonvenigis novan landan sektion de TEJO: La Junulara Esperantista Burundia Organizo (JEBUO) estis akceptita kiel 45a landa sekcio. Cetere al la komitato estis alelektita nova komitatano C. Heming W. Thorbjørnsen el Norvegujo.

Pasporta Servo reformota!

Unu el la plej konataj kaj popularaj servoj de TEJO estas la gastiganta reto Pasporta Servo kiu jam de pli ol 20 jaroj faciligas vojaĝojn kaj renkontojn en la Esperanto-mondo. La komitato decidis debaze renovigi tiun servon kiu ĝis nun konsistis ĉefe el la papera adreslibreto. Estontece dinamika interreta datumbazo plifaciligos la servon. Jam la 2009a eldono aperos en freŝaj vestaĵoj kun nova vizaĝo. Malgraŭ la plivalorigo de la interretaj servoj papera eldono daŭre disponeblas.

Pli aĝa, pli granda...

La IJKn 2008 partoprenis pli ol 350 homoj, kaj TEJO bonvenigas 120 novajn individuajn membrojn. Ĉiuj komune festis dum la IJK la 70-jaran jubileon de la fondo de TEJO en 1938.

TEJO-alvoko

IJK 2010 en via lando!

TEJO alvokas vin **TEJO-komisiono kunorganizas**

kandidatiĝi, tra via Landa Sekcio, por organizi la 66-an IJK-n en via lando. Eblas kandidatiĝi ĝis la 15an de decembro 2008. Ĉi-jare la nova "TEJO-komisiono" transprenos parton de la organiza laboro.

kion TEJO faros?

- preparos kun vi buĝeton
- varbos por la evento
- provizos
 - retpaĝaron
 - aliĝsistemon
 - datenbazon
 - projektmajstrumadon
 - vikion
- helpos pri subvencipetado

kion via teamo faros?

- trovos kaj traktos kun ejoj
- preparos programon
- surloke organizos
- librotenos
- traktos invitleterojn
- traktos lokajn kontaktojn
- metos informojn en la paĝaron

Konsisto de teamo

Lastatempaj IJK-j

Kovrov, Rusio	2004
Zakopane, Pollando	2005
Sarajevo, Bosnio k Hercegovino	2006
Hanojo, Vjetnamio	2007
Szombathely, Hungario	2008
Liberec', Ĉeĥio	2009
.... ?	2010

TEJO-komisiono:

- administrado
- financa planado
- informado
- varbado
- konsultado

Loka teamo:

- kelkaj kernaj organizantoj
- helpantoj

Kontaktu por pli da informoj:

vildana@tejo.org

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo
Retadreso: gregor@tejo.org

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)
Militärstrasse 14, 8004 Zürich, Svisujo
Retadreso: anna-laura@tejo.org

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)
A.B. Šimića 5 ,Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino
Retadreso: vildana.delalic@hotmail.com

• Sergej TYRIN (Kasisto)
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo
Retadreso: interdist@gmail.com

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450
Retadreso: rogener@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blogon ĉe tejo.org
- eblecon envolviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

Rubriko Esperanto en Interreto

Jen la unua kontribuo de leganto al la rubriko "Esperanto en Interreto". Mi invitas ĉiujn aliajn legantojn ankaŭ kontribui al ĉi tiu rubriko.

Retradioj

Utiligante la interreton kiel elsendo-rimedon, multaj esperantistaj skipoj nun aktive elsendas regulajn radio-programojn en nia lingvo. Kelkaj kreskis el jam ekzistantaj laboroj antaŭe elsenditaj per pli tradiciaj rimedoj, kelkaj estas nove fonditaj per la modernaj teknikaj ebloj. Apenaŭ imageblas pli bona maniero per kiu agordi la orelon al parolata Esperanto por personoj kiuj malofte kontaktas vid-al-vide esperantistojn. Menciigās ĉi tie nur kelkaj el la multaj aŭskult-ebloj.

Pola Radio

Jam fama pro siaj longdaŭraj elsendoj per mallongonda radio, la skipo de Radio Pola nun elsendas per la interreto ĉiutage. Kutima enhavo de la elsendoj estas raportoj pri eventoj en Pollando, rigardo tra la esperanta gazetaro, intervjuoj kun interesaj esperantistoj, kaj raportoj pri aranĝoj el nia movado. Ĉion oni prezentas per flua kaj imitinda lingvouzo.

polskieradio.pl/eo

Radio Verda

Malpli formalaj sed certe egale bonkvalitaj estas la elsendoj de Radio Verda kiuj trafas nin el Kanado. Laŭforme ĉi tiuj programoj pli similas la

kutiman el-dormo-ĉambran etoson per kiu naskiĝis la tiel nomata *podkasto** tradicio, sed el tio certe fontas ĝia allogo. Aŭskulti Radion Verdan estas kvazaŭ leĝere babili esperante kun ĉarmaj amikoj. La etoso estas vigla kaj amuza, per diskutoj kaj muziko.

radioverda.com

Radio Esperanto

Rusujo reprezentiĝas ĉi-liste per la laborantoj el la konata gazeto, *La Ondo de Esperanto*. En ilia *podkasto** oni aŭdas interesajn diskutojn, ekzemple instruajn prezentojn pri Rusujo, artikolojn el la Ondo, kaj esperantan muzikon; ĉio prezentiĝas profesie kaj antentokapte.

la-ondo.rpod.ru

Espereble tiu ĉi supraĵa trarigardo instigas al pli profunda plaŭdo en la esperantlingva retradia maro.

Paul Roberts el Britujo

* podkasto = (abonebla) retradio – foje uzata esperantigo de la angla *podcast*